## La 9a en Eŭropo

60a datreveno de la Deklaracio Schuman, 9a majo 1950

De vendredo 7a ĝis dimanĉo 9a de majo 2010, en Verdun kaj Metz okazos **internacia kaj ekumena renkontiĝo pri Eŭropo**. La programo estas legebla en pluraj lingvoj en la oficiala TTTejo: http://www.9mai2010.eu/

Jen, parta traduko de la ĝenerala prezento:

En 1950, la plano Schuman proponas efektivan reakordiĝon inter la hieraŭaj malamikoj, pere de konkreta kaj preciza realigo: la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo. La 60a datreveno de tiu propono donas okazon **rigardi la iritan vojon al konstruo de tiu Eŭropa Komunumo** kaj pridemandi pri ĝia estonteco. Por la nuntempaj generacioj, la reakordiĝo estas pasinteca donitaĵo kiu ne plu koncernas ilin. Hodiaŭ, kiam pli kaj pli rapida tutmondiĝo kunestas konstante kun kreskanta individuisma rezisto, indas pridemandi kiel ni povos daŭrigi KUNVIVI kaj **longdaŭre teni tiun malfortan pacon** kiu senĉese minacas rompiĝi?

Eŭropa manifestacio

Kunlabore kun, unuflanke, la religiaj organismoj kiuj akompanas la konstruan proceson de Eŭropo serĉanta sian unuecon kaj, aliflanke, la diversaj instancoj kiuj strukturas la reton de kongregacioj kaj religiaj komunumoj en Eŭropo, la diocezoj de Metz kaj Verdun deziras komune celebri la 60an datrevenon de la Deklaracio Schuman (9 majo 1950) pere de signifa tuteŭropa manifestacio.

**KUNVIVI** estas la temo proponita por orientigi la eventon, kiu celas signi la ŝtupon de la 60 unuaj jaroj de tiu paca proceso, kuraĝe engaĝita de la Patroj de Eŭropo post la dua mondmilito.

## Projekto Pasko 2011




Venontjare, Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo okazos en Sète, de 22a ĝis 26a de aprilo 2011, t.e. de Sankta Vendredo ĝis Paska Mardo. Je la unua fojo, Espéranto-France kaj SAT-Amikaro kune kongresos.

Ankau nia Franca Katolika Esperantista Asocio estis invitita partopreni. Nu, ni nun studas la eblecon **prepari kaj kune festi Paskon en Esperanto**, ekde Sankta Ĵaŭdo. Tio estus okazo traduki kaj preĝi diservojn kiuj verŝajne ankoraŭ ne ekzistas en nia lingvo. Se tiu projekto interesas vin, bonvolu informi la prezidanton: bruno@breviero.org.

http://esperanto.sete2011.free.fr/irem.php

# Franca Katolika Esperantisto

dulingva informilo de **F**ranca **K**atolika **E**speranto-**A**socio
bulletin bilingue de l'**A**ssociation **C**atholique **F**rançaise pour l'**E**spéranto
56, rue Corvisart, 75013 PARIS - www.fkea.fr
Association Loi 1901 décl. à Paris - Siret: 409 706 371 00013

**Pasko 2010**

## Le mot du président

Chers amis,

Cet hiver, j'ai téléphoné à une vingtaine d'entre vous que je ne connaissais pas. Quelle joie de constater la grande diversité de notre association, où toutes sortes de courants et sensibilités catholiques se retrouvent!

C'est bien ainsi que doit être notre mouvement espérantiste: non pas l'uniformité d'avant Babel, lorsque "Toute la terre avait une seule langue et les mêmes mots.", mais l'unité dans la diversité, l'unité de personnes qui, venant de tous les horizons, se retrouvent et communient librement.

Il est important que cette diversité soit représentée au comité de notre association. C'est pourquoi je lance cet appel solennel: si vous avez un peu de temps et d'énergie à consacrer, écrivez-moi.

Notre prochaine assemblée générale se tiendra durant le congrès international des espérantistes catholiques, à Paris entre le 27 juin et le 3 juillet (date à préciser).

Merci à tous ceux qui ont réglé leur cotisation 2009-2010. Outre que la somme de ces cotisations permet à notre association de fonctionner, chacune donne du poids à notre action commune.

Bruno Masala, bruno@breviero.org - 18, rue Gambetta, 57000 METZ

*Très prochainement*

**Congrès interassociatif** des espérantistes français et allemands, à **Kaiserslauten, 21 - 25 mai 2010**
http://esperanto-france.org/

**Congrès international des espérantistes catholiques**, à **Paris, 27 juin - 3 juillet 2010**
http://www.ikue.org/

## Katolikaj esperantistoj de Parizo kunfestis Novjaron che la Dominikanoj

*La 31an de decembro 2009, pluraj membroj de Franca Katolika Esperantista Asocio kunvenis en la Couvent St-Jacques por legi la libron de la profeto Jona kaj kunfesti. La vesperon organizis Fr. Benoît Ente op kaj Michèle Abada-Simon.*

Fr. Benoît bonvenigas siajn gastojn
(fotis Viktoro Simonnet)



La kunveno komencis je la sepa kaj duono. Kelkaj el la partoprenantoj venis por preĝi kun la fratoj la vesperan preĝon. La aliaj partoprenantoj venis poste : Nicole kaj Anne-Marie Chaney, Sylviane kaj Henri Lafargue, Viktoro Simonnet, Jean-Louis Poullet kaj Michèle Abada-Simon, Francisko Simonnet (...).

Ni legis la libron de Jona, unu el la 12 malgrandaj profetoj, en la preĝejeto de la kunvenejo. Kiam Sylviane finis la lastan ĉapitron, ni diskutis kune, celante kompreni la unikecon kaj la riĉecon de la rakonto. Nia konkludo rigardis kion povas diri Jona al esperantistoj ?

Post la legado, ni tre bone manĝis la dominikan finjaran manĝon, en la malgranda manĝejo de la kunvenejo, kaj tre bone diskutis en ĝoja atmosfero. Tiel estis, ke noktomezo surprizis ĉiujn. Ni kisis sur la vangoj unu kun la alia, ni trinkis ĉampanon kaj manĝis la delikatajn blankajn ĉokoladojn faritajn de Michèle.

Kiam ĉiuj reiris hejmen, ni pensis ke estus bona se okazus sama legado, eble kun alia religia teksto, en la jaro.

Fr. Benoît Ente op

En la jarfina vespero okazis en Parizo tre agrabla kaj, miaimprese, esperiga kunveno, en la Sankta-Jakoba monaĥejo de la Dominikanoj.

Nur parton mi povis ĉeesti (...) sed mi povas atesti, ke la ĉeestantojn tre ĝojigis la kunesto, kaj, ŝajne, ne nur pro la tre festecaj manĝaĵoj, kiujn ili frandis.

Francisko Simonnet



dum tuta horo antaŭe, ekde la 18h, li bonvenigas vizitantojn sen rendevuo, ĉe la enirejo. Vendredon 29an de januaro, post la malferma ŝabata diservo en la sinagogo Tilsitt, mi iris sola al la katedralo. Mi havis kun li la jenan dialogon:

BM: Bonan vesperon, kara Patro-Episkopo. Mi estas Bruno Masala, de la katolika Esperanto-movado. Mi sendis al vi preĝokarton kun Patro Nia en Esperanto.

kPB: Kio estas la katolika Esperanto-movado?

BM: Estas movado kiu arigas katolikojn kiuj parolas Esperanton.

kPB: Mi havas bildstrion en Esperanto: "La krabo kun oraj pinĵiloj..."

BM: Nu, jes "La krabo kun oraj pinĉiloj" estas albumo de Tinĉjo! (Mi miregas ke li rememoras la titolon kun nur unu prononcerareto!)

kPB: Kion faras la katolikaj esperantistoj?

BM: Tre diversaj agadoj: ekumena kaj interreligia dialogo, eldono de la Biblio en Esperanto, bonfarado, organizado de sanktaj mesoj dum kongresoj de esperantistoj ktp.

kPB: Ĉu vere oni celebras meson en Esperanto? Kiam oni celebros meson esperantlingve en Lyon?

BM: Ni trovu okazon de renkontiĝo de esperantistoj ĉi tie. Nia emerita animzorganto loĝas sufiĉe apude en Allex, Drôme. Li estas Spiritano.

Mi tre ŝatis ke li faris trafajn demandojn por konatiĝi pri nia movado.

Tri semajnojn poste, vendredon, 19an de februaro 2010, mi gastigis en Lyon mian fraton kun la edzino kaj la du filoj adoleskantoj. Post familia vizito de la malnova urbo, ni naŭope eniris la katedralon kaj enviciĝis por saluti nian episkopon.

Ekde kiam li vidis nian dumonatan Gaetanon li ĝojegis kaj, ci-umante, petis Anne ĉu li povas iomete preni lin en la brakoj.

Mia bofratino demandis kio estas primaso de la Gaŭlujoj, kaj li rakontis pri sanktaj Pothino kaj Ireneo, pri la plej malnova episkopejo de Francio, ke li mem estas la 135a ktp. La familio de mia frato tre ŝatis lian simpatiecon kaj simplecon.



Gaëtan Masala en la brakoj de kard. Barbarin, en la katedralo de Lyon, 19an de februaro 2010.

Bruno Masala

## Renkontoj kun kard. Barbarin
persona atesto de Anne & Bruno Masala

Nia episkopo, en Lyon, kard. Philippe Barbarin, estas vigla paŝtisto kaj senpera apostolo. Ni renkontis lin unuafoje en 2002 dum internacia kolokvo pri *la spirita vivo en la nuntempa mondo*, organizita de Studium Notre-Dame de Vie, en Vénasque, sudorienta Francio.

Tiam li estis freŝdata ĉefepiskopo de Lyon, ankoraŭ ne kardinalo. Li prelegis pri sia interkultura sperto kiel profesoro en Madagaskar. Anne kaj mi estis tre kortuŝitaj pro lia aliula aliro, tre simila al esperantista sperto kaj pensmaniero. Tial, mi aliris lin post la prelego kaj prezentis kelkvorte pri la katolikaj esperantistoj. Li elmetis demandon pri Esperanto kaj mi promesis skribi al li pri tio. Pli ol du jaroj poste, mi sendis leteron kaj li respondis pere de sia sekretario: post atentigo pri Babelo kaj la tento de tutmonda povo pere de ununura lingvo, li volonte benis la Kunvivan Rozarion de esperantistoj.

Duan fojon, ni revidis lin sep jarojn pli malfrue, okaze de la inaŭguro de la Instituto de Sources Chrétiennes, la 17an de septembro 2009: nu, dum la somero 2009a, mi laboris en la Instituto por helpi en la projekto Biblindex, indekso de citaĵoj kaj aludoj al la Biblio ĉe la Patroj de la eklezio. Ĉifoje ni estis tuta familio, kun du geinfanoj kaj Gaetano en la sino de Anne. Ĉeestis multaj moŝtuloj kaj profesoroj kaj ni estis la sola familio. Post la paroladoj, ni aliris lin kaj rememorigis al li pri ni kaj pri la Kunviva Rozario de esperantistoj: “kunviva rozario en Esperanto, jen frenezeta ideo, mi amas frenezuletojn”... li respondis simpatie.


Familio Masala kun kard. Barbarin

Kard. Barbarin tre zorgas pri la universala eklezio. Li estas persona amiko de Patriarko Kirilo, de la rusa ortodoksa eklezio, kiu antau kelkaj jardekoj ĉeestis lian sacerdotan ordinon. Li ankaŭ tre interesiĝas kun dialogo kun la judoj. Ĉiujare, li partoprenas en Jom Kippur en la granda sinagogo de Lyon kaj li estas persona amiko de la Granda Rabeno de Francio, Gilles Bernheim.

En Lyon, ĉiuvendrede, li celebras sanktan meson en la katedralo, je la 19h. Kaj,



## Messe des Nations, Choisy-le-Roi - 10 janvier 2010

Plusieurs membres de notre Association ont participé à la Messe des Nations, avec la Paroisse Saint-Louis de Choisy-le-Roi. En la fête du Baptême de Notre Seigneur, trois petits enfants de la paroisse ont été baptisés.





A la fin de la messe, après les voeux de Nouvel An en malgache, espagnol, vietnamien etc., ce sont nos membres Pierre Royer et Sylviane Lafargue qui ont souhaité une bonne année à toute l’assemblée, en Espéranto, au nom de toutes les langues qui n’étaient pas représentées.

Après le buffet international, un groupe folklorique portugais a dansé.

Plus de photos, sur le web:
messe: http://katolika.free.fr/ChoisyMesseNations2010/
fête: http://katolika.free.fr/ChoisyFeteNations2010/


Photos Bruno Masala

Fin décembre, Bruno Masala a reçu pour l’association une crêche confectionnée par les orphelins de Rutshuru, que nous avons aidés l’année dernière.

Après avoir illuminé le foyer de la famille Masala pour Noël 2009, la crêche a été confiée pour 2010 aux soeurs Chaney, qui pourront ensuite la transmettre à d’autres membres.

Après la fête, le bureau de l’association s’est réuni au siège d’Espéranto 94.


Plus de photos de la crêche confectionnée par les orphelins de Rutshuru, sur le web:
http://katolika.free.fr/StaltrogoRutshuru/

# Ordination sacerdotale du fr. Benoît Ente op

Notre association compte un nouveau prêtre espérantiste: le fr. Benoît Ente, dominicain. Lorsqu'il était novice au couvent de Lille, il a découvert l'Espéranto grâce au P. Louis Bourdon et le parle désormais couramment.

Le 27 février 2010, avec trois de ses frères, il a été ordonné prêtre à Paris. Plusieurs membres de notre association étaient présents, ainsi qu'à la première messe, qui a été célébrée à Lille le lendemain. Voici quelques photos:







Plus de photos de Louis Jeuland et Brigitte Jean-Baptiste
http://katolika.free.fr/ordinoFrBenoit/

Au nom de l'association, le président a écrit au provincial des Dominicains, le P. Bruno Cadoré, ainsi qu'au prieur du couvent du fr. Benoît, le P. Michel Mallèvre, pour témoigner de notre joie et de notre communion dans la prière. Réponse du Père Provincial:

De : Bruno Cadoré    Envoyé : 26 février 2010 15:58    À : Bruno Masala

Merci beaucoup pour ce témoignage d'amitié et votre prière à l'occasion de l'ordination du frère Benoît qui nous réjouit beaucoup

Je vous assure de ma prière    Très fraternellement
Frère bruno cadoré, op



# Paska mesaĝo

al katolikaj esperantistoj, de P. Benoît Ente op

Karaj gefratoj,

La sankta semajno komenciĝas kaj ĉie sur la tero kunvenos homoj por stranga afero : ne por vidi futbalan maĉon aŭ 3D filmon sed por aŭskulti la rakonton pri la Filo de Dio, kiu estis humiligita, krucumita de homoj kaj tri tagojn poste releviĝis el la mortintoj. Tuj post sia releviĝo li demandis al siaj disĉiploj: "Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron ?" Jes Sinjoro, sed kial ? Ĉu la kristo ne povis eniri en sian gloron sen trapasi tra la mortiga perforto de homoj ?

Fakte Jesuo Kristo elektis tiun vojon ĉar li deziris enskribiĝi en la mondo de la homoj kaj ne en alia mondo. Li volis enskribiĝi en la mondo farita de la homoj rezultante de ties peko. Sur la kruco, Jesuo montras al ĉiuj la frukton de la malamo de homoj. Sen la kruco, la vivo de Jesuo estus mensogo, kvazaŭ reklamo. Se vi rigardus nur la reklamojn, vi pensus ke la mondo tute bone fartas, ke nur feliĉo plenigas ĉiujn korojn. Jesuo malfermis niajn okulojn pri la problemo de la mondo kaj konsekvence li donis al ni soifon de savo. Kaj ne nur tion sed ankaŭ, kie Li enskribis Sian vivon, tie Li malfermis vojon de savo por ni, la vojon de la fido en nia Patro.

Tial ni ĝojas ĉar kaj la homoj kaj la mondo estas tute renovigitaj en Kristo. La morto estas venkita por ĉiam. Ĉi tiun feliĉan anoncon la kristanoj devas proklami sur la tuta tero.

Ni ricevis la donacon paroli esperanton. Tio signifas speciala misio por ni : partoprenante internaciajn kunvenojn kun popoloj el diversaj kulturoj kaj religioj, ricevante ĉiujn kaj ricevate de ĉiuj, ni atestas ke la savo donita de Dio estas por ĉiuj kiuj vivas sur tiu mondo. Ne timu iri renkonte al la aliaj ĉar tie atendas nin Nia Sinjoro.

Bonan Paskan feston
sub la ombro de la Sankta Spirito.

